NUMERO 12

espéranto
HAUTS-DE-FRANCE

30 JUN 2019

# NORDA ★ KURIERO

## Esperanto en la Eŭropunia baloto!






Dimanĉon la 26an de majo 2019 la francoj balotis por siaj reprezentantoj en la Eŭropa Parlamento. Kompare kun la baloto de 2014 ili partoprenis pli multnombre ĉi-jare, t.e. 50,12 % de la balotrajtigitoj.

En Francio konkuris 34 kandidatolistoj. Inter ili la partio Eŭropo Demokratio Esperanto portis la liston "*Espéranto, langue commune équitable pour l'Europe*" (Esperanto, justa komuna lingvo por Eŭropo), kies unua kandidato estis Pierre Dieumegard. Du esperantistoj de norda Francio aliĝis, nome Jean-Claude Roy kaj Michel Dechy.

La oficiala kampanjo ebligis al ili informi la publikon pri la internacia lingvo per afiŝoj, intervjuoj kaj oficialaj filmetoj en televido. Fine ili ricevis 18 567 voĉojn! Tio ne sidigas ilin en la Eŭropa Parlamento, sed ili atingis sian celon: aŭdigi Esperanton!

# Kongresis britoj kaj francoj en Dovro



Preskaŭ cent britoj kaj francoj kunkongresis en Dovro (Anglio) de la 12ª ĝis la 16ª de aprilo 2019 okaze de la centa brita Esperanto-kongreso.

Dum tiuj belaj kaj malvarmetaj tagoj la partoprenantoj ĝuis bonegan etoson kaj riĉan programon el prelegoj, vizitoj, dancoj kaj koncerto. Okazis ankaŭ la jarkunveno de la franca asocio Espéranto France, post kiam Didier Loison estis elektita prezidanto.

Dimanĉe la kongresanoj povis viziti la urbon Kalezo (Calais) kun Michel Dechy, kiu jene raportis:

*"Mi havis la plezuron ĉiceroni dimanĉe por grupo el 36 britoj en la urbo Kalezo. Ni grimpis lifte au ŝtupare ĝis la gvatrondo de la urbodoma belfrido. De tie ni admiris la tutan ĉirkaŭaĵon: la havenon kaj la ĉirkaŭan pejzaĝon ĝis la blankaj klifoj de Dovro! Poste ni vizitis la belegan muzeon pri punto. Ni fine malkovris la plej faman bronzan statuaron de Rodin, kiun li skulptis memore al la sinofero de ses kalezaj burĝuloj dum la centjara milito. Por ĉiuj ni Kalezo estis plezuro!"*

# Michel Dechy humuris kun Hergé

Michel Dechy, prezidanto de la Nordfrancia Federacio, fakiĝis pri Hergé kaj lia mondskale konata verkaro *La Aventuroj de Tinĉjo*. Li ja laboris por eldono de la Esperantaj bildrakontoj *Tinĉjo en Tibeto* kaj *La Templo de l' Suno*, kaj mem eldonis la kajeron *Bildstrioj kiel Lernolibroj* bazitan sur pluraj scenoj de Tinĉjo.

Krome, nun Michel Dechy koncentriĝis pri aparta temo: humuro en la verkaro de Hergé. Ĉi tiu ja abundas je roluloj kaj scenoj ridigaj! Ĝuste pri tio li prelegis ekz. en la Mediteranea Esperanto-Semanjo, kiu okazis en Provenco en marto 2019, kaj en Angers (okcidenta Francio) la 28an de aprilo 2019.



Michel Dechy preleganta en Angers

# Georgo Handzlik kantis nian vivon!

Kadre de sia turneo en Francio la fame konata pola esperantisto Georgo Handzlik koncertis en la Esperanto-klubo de Araso la 20an de majo kaj en tiu de Lillo la 21an de majo 2019. Li vojaĝis kun sia edzino Vinjo. Dum tiuj du tagoj la paro vizitis la urbon Lillo kaj frandis la lokan kuirarton.

Georgo kantis multe pri la esperantista vivo kaj la Esperanto-movado. Tiel li gajigis la aŭskultantaron per siaj kantoj pri la "fina venko", la Esperanto-kongresoj, la elekto de prezidanto en Esperanto-klubo, kaj eĉ pri insultoj kaj sakroj en Esperanto!





Vinjo kaj Georgo (maldekstre) en lilla restoracio

La afableco kaj humuro de Georgo tiom plaĉis, ke la lillaj lernantoj eĉ volis uzi kanzonon de li (tiun pri insultoj) dum kurso-seanco. Ja ankaŭ per kantoj kaj eĉ fivortoj oni lernas lingvon!

# En Berseo kunsidis la Lilla klubo

Lundon la 27an de majo 2019 la membroj de la Lilla Esperanto-klubo kunsidis en la urbeto Berseo (Bersée). Ja la Bersea Esperanto-Rondo estas ligita al la Lilla klubo. Tiu vespero estis okazo por revidi konatojn kaj koniĝi kun novuloj. La gastigantoj France kaj Richard Valet kun Francine kaj Claude Longue-Epée regalis la ĉeestantojn per abundaj frandaĵoj. Tiu amikeca momento estis vere sukcesa!



# Nova partnereco kun Jules Verne

Komenciĝas ege interesa partnereco inter nia loka asocio kaj *Maison de Jules Verne* (Domo de Jules Verne).

Kiu estas la genezo de tiu kuna agado?

Kiel kutime, kiam ni gastigas eksterlandanon, ni vizitigas la domon de Jules Verne, nia fama subteninto. Kaj, kiel kutime, ni parolas en Esperanto en la domo. Kaj en januaro 2019 ni estis tie kun Alan Neven Kovacic, kroato. Kaj oficistino de tiu domo tuj ekkris aŭdante nin: “Vi parolas en Esperanto!!” Kaj ŝi tuj poste diris: “Ni laboru kune, mi havas projekton!” Nu, bone! Sekve, Alan, sola, vizitis sen problemo, ĉar li parolas multajn lingvojn, kaj li elektis libreton de prezentado de la domo en la itala.

Tiu juna oficistino nomiĝas Bérengère, kaj ŝi lernis Esperanton per Lernu.net.

Pri kio temis nia interparolado, dum Alan vizitis? Jen la projekto de Bérengère:

Ekde la dua semestro 2019, la domo Jules Verne “verdiĝu”, kaj la projekto nomiĝas (mi tradukas) “Jules Verne kaj la lingvoj, Jules Verne esperantisto”! Bona projekto! Kaj ni komencis kune pensi pri la enhavo. Bérengère decidis, ke ĉiun unuan mardon de la monatoj ŝi estos kun la klubanoj de la asocio por pensi, prepari, kune labori. Kaj tion ni faras.

Kaj jen la enhavo :

La kerna evento okazos la **15$^{an}$ de decembro 2019**! Mi parolos pri tio poste! Paciencon, karaj legantoj!

Ekde aprilo 2019:

Jes, la agadoj jam komenciĝis! La klubo fintradukas la libreton en Esperanton por la vizitantoj. Kaj mi komencis traduki novelon de Jules Verne: *Une fantaisie du docteur Ox* (Kaprico de Doktor’ Oks), kaj ni, samklubanoj, komencas proponi plibonigojn de la traduko.

Kaj, en somero, ĉu Esperanto ferias?

Tute ne! Ni poluros la tradukon de la doma libreto, kaj al tiu libreto ni aldonos prezenton de la lingvo internacia en la franca kaj en Esperanto. Samtempe,


© F. Lelavandier / Maison de Jules Verne

Bérengère kreos dulingvan kakemonon (tute ne temas pri “kaki monon”, persone mi ŝatus!! — sed pri alta bendo, kiu informos pri tiu kunagado), kaj ni tradukos aliajn aĵojn.

Kaj ekde septembro?

Ni pasigos la aŭtunan periodon preparante la grandan Zamenhofan feston en la domo de Jules Verne! Zamenhof kun Jules Verne en la famkonata domo. Zamenhof kaj Jules Verne certe revis tion; la loka klubo Espéranto 80 kaj la oficistoj de la domo realigos tion!! Kion ni antaŭvidas? Jules Verne mem vizitigos la domon al Zamenhof mem kun aliaj personoj kompreneble, Klara, kaj tradukistino de la paroloj de Zamenhof, ktp. Do temos pri teatrumita vizito de la domo. Certe ni ▶▶▶

## Nova partnereco kun Jules Verne (sekvo de la p. 4)

▶▶▶ surmetos vestaĵojn de tiu epoko. Atentu: okazos nur du sinsekvaj vizitoj de maksimume dudek homoj! Se vi deziros ĉeesti, ne forgesu anonci vin, kiam eblos. Paralele, homoj spektos ekspozicion. Iu sufiĉa granda ĉambro de la domo estos rezervita por babilado ktp.

Kaj dum vintro, ĉu la esperantistoj dormos kiel marmotoj kaj erinacoj?

Male! Ni daŭrigos la laboron pri la traduko de la novelo. Ni iros al bibliotekoj de Amieno por diskonigi Esperanton per grupoj de legado de libroj en Esperanto por junuloj kaj plenkreskuloj.

Okazos du prelegoj. Bone notu la datojn! Ni kalkulas je vi! Je via ĉeesto!

La 29an de februaro estos la prelego “Esperanto, lingvo por paco kaj amikeco inter popoloj”.

La 6an de marto estos la prelego “Jules Verne esperantisto”.

Kaj en printempo refloros Esperanto, sed, kiel vi konstatas, ĝi ne velkos dum vintro!

La 14an de aprilo 2020 grava okazontaĵo: inaŭguro de ekspozicio de ilustraĵoj far la studentoj pri arto. Por kio tiuj ilustraĵoj?… Por meti en la libron *Kaprico de Doktor' Oks*!

Kaj, laste sed ne balaste, ankaŭ en aprilo 2020 okazos dufoje en la domo de Jules Verne ludoj en familioj pri la temo “Universo de Jules Verne kaj Esperanto”, kaj oni utiligos la verkon *Studvojaĝo*.

Mi tutkore esperas, ke tiu programo allogos ne nur multajn amienanojn, sed ankaŭ multajn esperantistojn. Certe tiu ampleksa, ambicia kaj multfaceta programo plezurigos vin! Antaŭen! La nepoj nin benos! Ni kune atingos la celon!

✎ *Jean-Claude* ***Roy***

# Aleksandro Melnikov prelegos en Lillo

En oktobro la Lilla Esperanto-klubo akceptos Aleksandron Melnikov, kiu estas fame konata rusa esperantisto, membro de la Akademio de Esperanto, fakulo pri interlingvistiko kaj aŭtoro de multaj libroj.

Li prelegos en Lillo (MRES, 23 rue Gosselet) **vendredon la 18an de oktobro 2019** je la 19:00 pri la Ukraina krizo: “Nigro, blanko, ĉielarko”, temo aktuala inter Eŭropa Unio kaj Rusio.

Post la prelego eblos aperitive trinki kaj komune vespermanĝi en proksima restoracio.



K O L O F O N O

La ***Norda Kuriero*** estas la informilo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio. Ĝi eldoniĝas kvarfoje en jaro: januare, aprile, julie kaj oktobre.

Ĉefredaktas: **Katja Boen** kaj **Xavier Dewidehem**.
Enpaĝigas: Xavier Dewidehem.

Ni invitas la federacianojn kaj la klubestrojn sendi informojn, anoncojn, raportojn, artikolojn kaj fotojn al la *Norda Kuriero* per la jena adreso:

**kuriero@esperanto-nord.org**

ĝis la unua dimanĉo de januaro, aprilo, julio kaj oktobro.